logis al si Zinjon dum tuta ŝia vivo. Longa kaj malfacila estas la vojo al ĝi. Sed tio jam ne gravas.

Andreo ekvidis Zinjon frumatene. Ŝi staris, sin apogante kontraŭ la barilo kaj enpense rigardis grizan foron. Malgrasa, eta tute knabina. Andreo komence eĉ ne kredis, ke tio estas Zinjo.

Li rememoris la amaran tagon kaj komprenis, ke li ne devis tiam foriri. Pri ĉio li kulpigis sin. Li skribis al ŝi, longajn leterojn, sed neniun forsendis. Sen Zinjo io mankis en la vivo, io tre granda...

« Zinaida Nikolajevna, oni petas vin », alparolis Zinjon iu junulino.

« Mi iras » respondis Zinjo.
Kaj ŝi preteriris Andreon tute apude, jam aĝa, serioza kun meditema rigardo de la grizaj okuloj, ŝi ne rimarkis lin.

Malfrue vespere Andreo frapis ĉe la pordo de la kajuto de Zinjo. Knabino, kun kiu loĝis Zinjo, estis deĵoranta, kaj Zinjo solis.

« Saluton, Andreĉjo » diris Zinjo. Ŝi salte leviĝis de la lito, kie ŝi kuŝis kun libro. Kaj Andreo ĝene staris en la pordo.

« Sidiĝu » diris Zinjo. Ŝi ne eldiris miron. Tiel devis esti. Nun la tuta mondo, ĝis la plej malproksima, kaŝita en la neĝoj, lando de reĝino Maud, apartenis al ŝi, kaj ŝi devis venki.

« Jen neniam mi pensus, ke vi kapablas iri al Antarktiko » ne sen malico diris Zinjo. « Tio ja estas romantiko, fantazio, deliro ».

Nun estis ŝia tago, kaj ŝi volis iomete turmenti Andreon. Sed li rigardis ŝin kaj ne povis rekoni ŝian voĉon nek ŝian manieron de sinteno al li, kvazaŭ al infano..

« Mi iras, ĉar min sendas la Patrujo », diris Andreo, « Neniu romantiko, neniu fantazio. Mi, verdire, neniam pensis, ke vi estas kapabla ŝipi al Antarktiko. Mi pensis, ke vi povas vojaĝi nur sidante hejme sur kanapo. Mi estas fiera pro vi, Zina ».

Ili eksilentis. Ili ne havis, kion diri pli. Andreo, ruĝa pro konfuziĝo, sidis sur seĝrando kaj frotis la kaskedon. Zinjo ne sciis, kion fari. Kaj ŝi komencis rakonti. La vortoj fluis facile. Ŝi rakontis pri stepaj ŝipoj, pri peza, akvoplena argilo disrampa sub la piedoj dum pluvoj, pri knabinoj, forveturintaj al la konstruo, pri novaj ŝoseoj, pri la granda kanalo. Ŝi metis sur la tablon siajn delikatajn fingrojn kun hardita haŭto, kaj Andreo volis kisi la fingrojn.

Ĉu oni povas kompreni, pro kio oni amas iun? Zinjo rigardis Andreon kaj pensis: « Pro kio mi amas lin? Mi ne scias. Neniam mi sciis. Ĉiam mi amos, batalos. Verŝajne, mi estas forta ».

« Eble, oni povas ankoraŭ revenigi tion? », pensis Andreo, atentante sonojn de ŝia voĉo.

Kaj Zinjo subite eksilentis. Ŝi rememoris sian doloron, sian solecan, ĉiaman doloron. Sed Andreo sidis apude, kaj ne estis loko por ofendo en ŝia koro.

Venis post la deĵoro la najbarino de Zinjo. Andreo foriris el la kajuto. Li iris sur la supran ferdekon. Estis silente. Obtuze bruis la maŝinoj. Nigralake flagris la maro.